FN PER ANC 47

ESPERANTO
# NORMANDA BULTENO
.unuiĝo de la normandaj esperantistoj
n°170
TRIMONATA BULTENO. BULLETIN TRIMESTRIEL.
de L'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE:

DECEMBRO 1990A - ( VINTRO 1990A - N° 85A NOVA SERIO )

*Minimuma Kotizo por 1991 : 45 frankoj. CCP 283 40 H ROUEN*
*Sendu vian postcekon rekte al via CCP Centro.*
*bankcekon al Pierre Quillaud*
*16, rue Lt Vaisseau Paris 76 120 Le Grand-Quevilly*

*Redaktas : Yves Nicolas 17-37 Quartier du Bois*
*14 200 Hérouville St Clair. Tel. 31 95 11 81*

# FELIĈAN NOVJARON

# 1991

Sanon kaj feliĉon por ĉiuj anoj de la ŝipo "Esperanto". Tempestoj kaj danĝeraj klifoj ne mankas, ĝi bezonas ĉiujn siajn ŝipanojn por vojaĝi plu al senĉesaj venkoj !

Per niaj manoj, kaj brakoj, ni firme strêcu la velojn por iri pli rapide. Sed per niaj kapoj (for la brando kaj la havenaj ĉiesulinoj) ni bone kalkulu la vojon.

Ŝipanoj de la ŝipego "La Angla" aspektanta pli dika kaj fortika, ignoras nin aù provas nin dronigi, ĉu devige ni por ĉiam* la saman trafiklinion? Ventoj "Komerco", "politiko", "potenco" pli favoras al ĝi ol al nia velŝipo kies plej bonaj ventoj nomiĝas "amikeco", "toleremo", "solidareco"...

Normandaj ŝipanoj ne forgesu : viaj praavoj multe spertis en velarto. En tiu jaro 91, kaj dum la sekvantaj, la ŝipo "Esperanto" ankoraù bezonos nin por ripari, modernigi, kaj "kapti" novajn samsortulojn !

*sekvos

## Kultura Esperanto-Domo



*GRESILLON 49 150 BAUGE*


*La "Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj" posedas bienon kun kastelo kaj 18 hektara parko.*

*Ĉiujare ĝi gastigas : kursojn, prelegojn, distraĵojn, ekskursojn,...*

*Ĝi disponigas al la restadantoj : kursoĉambrojn, riĉan bibliotekon, riĉan libro-servon salonojn, interesan "butikon", sport-terenon.*

*Jam vizitis ĝin miloj da samideanoj.*
*Ĉu baldaù vi ?*
*Petu detalan programon kaj tarifojn !*

# Nia Ĝenerala Asembleo



*Ni povus fanfarone aserti ke la Ĝenerala Asembleo lastoktobre okazinta en Hérouville (14) estis plensukcesa. Sukcesoj jes ja estis, sed mankoj tutcerte ne mankis !...*

*Tiu asembleo ne solvis la problemon de nia jam plurjara endormiĝo. Nur 35 partoprenintoj. Preskaŭ senŝanĝe la pasinta estraro daŭre agos, kvankam la asocio forte bezonus novajn ideojn kaj agemulojn.*

*Tamen, tia strukturo necesas por ke samideanoj interŝanĝu la spertojn, amike rilatu kaj interkonatiĝu. Tiuflanke nia ĝenerala asembleo plene efikis.*

*Ofte, la distra parto de tia aranĝo pli allogas ol seriozaj kunvenoj dum kiuj kelkaj sin kaŝas malantaŭ sian P. I. V.on (cetere aĉetinda !) por pli serene oscedi... Tiujare, Georges Lagrange kaj Nikolin', ambaŭ tre afablaj, regalis nin. Belan Epokon kaj Parizon ni kantis dank'al plej famaj kanzonoj "Frufru", "Vi turnigas mian kapon", "la tempo ĉeriza", "Marĵolena", k. T. p.... Georges Lagrange liveris al ni tre interesajn studojn pri ege malsamaj pioniroj de Esperanto, t. e. Edmond Privat kaj Lanti, ju pli bunta, des pli forta kaj riĉoplena estas la movado.*




# antaŭparolo de nia Prezidanto

*"Karaj Gesamideanoj,*

*Multaj ŝanĝoj okazis en la mondo post nia pasinta Ĝenerala Kunveno. La Berlina muro forfalis, multaj politikaj reĝimoj malaperis aŭ sanĝiĝis. Multaj landlimoj malfermiĝis , permesante tiel al la homoj forvojaĝi kaj ekkoni aliajn landojn, kaj fine Germanujo reunuiĝis. Do, la ĉefa tendenco de nia epoko estas unuiĝo de la homoj. Cetere, jam de longe, iom post iom formiĝis la Eŭropa Komunumo, kiu baldaŭ malaperigos la limojn inter la landoj kiuj konstistigas ĝin. Ĉio-ci ankaŭ estas granda espero por ni, car la homoj pli kaj pli bezonos komuniki inter si malgraŭ la diverseco de la lingvoj.*

*Tamen, estas ankaŭ klare videble ke, la homoj ankoraŭ ne plene konscias pri tio, kaj estas pretaj akcepti ian ajn komunikmanieron. Ĉar de jarmiloj la homoj estis dividitaj kaj parolis diversajn naciajn lingvojn, ili ne imagas ke, oni povas interkominiki alimaniere ol lernante unu aŭ plurajn*

*fremdajn lingvojn, kiujn, post multe da laboro, oni plej ofte nur sukcesas balbuti, kaj se oni parolas al ili pri Esperanto, ili ne interesiĝas aŭ eĉ foje mokas, imagante ke Esperanto povas nur taŭgi kiel kodo por demandi pri sia vojo, aŭ ke , ĉar artefarita, ĝi certe estas aĉa kaj ne taŭga. Aliajn stultaĵojn el ĉiuj specoj mi aŭdis de personoj, kiuj asertis ilin kun forto kvankam ili sciis eĉ ne unu vorton de Esperanto, nek studis la lingvan problemon.*

*Estas do paradokse ke, nia epoko estas samtempe tre favora al nia afero kaj ke, la homoj estas pretaj akcepti ian ajn solvaĉon de la lingva problemo. Pro tio, la Esperantistoj devos, nuntempe pli ol iam ajn, informi kaj informadi senĉese pri nia lingvo, kaj pri la nesupereblaj avantaĝoj kiujn ĝi alportos al ĉiuj, kiam ĝi plene ludos sian rolon en la mondo. Estus ja bedaŭrindege lasi la mondon adopti malpli taŭgan solvon ol Esperanton, ĉar tio riskus poste daŭri longe, se ne eterne ? Ni do ne lasu tion okazi. Pli ol ĉiam ni informu pri nia lingvo, kaj ni montru ke, ĝi estas nuntempe la plej simpla, la plej logika, la plej justa kaj la plej malmultekosta solvo de la tutmonda lingvoproblemo. En unu vorto : ĝi estas ĝia sola racia solvo".*

*Pierre* ***POTTIER***

## RESUMĒ.....

*Nia komitato (estraro) kunvenis dufoje por antaŭplani nian nunan renkontiĝon. Malgraŭ malkuraĝigaj pasintaj kunvenoj, ni deziris reliefigi tiun amikan renkontigon per allogaj programeroj. Kiel por Normanda Rendevuo kiu ne reebliĝis, ni venigis intereseġan preleganton kaj esperantistan artistinon Pri vivo de nia Asocio, ni bedaŭras maloftecon de kontaktoj pro malproksimeco, tamen almenaŭ departemente, ni ĉiam informas grupestrojn pri lokaj manifestacioj.*

*Ni antaŭvidis alvenon de Soveta samideano, sed pro prokrasto de sia rondiro, nur gekomitatanoj konatiĝis kun ŝi dum la dua komitatkunveno. Kelkaj kluboj gastigis ŝin.*

*Nia bulteno estas la nura ligilo kiu eĥoas pri nia Normanda Movado. Pro malmultaj komunikiloj kaj endormiĝo de nia Afero, ĝi aspektas magra, kaj eble malkontentigas la legantaron, ĉu ni bezonas redefini ĝian celon kaj enhavon ?*

*Sylvie* ***CARON***

*La nova komitato konsistas el jenaj membroj :*



***POTTIER Pierre, Prezidanto***
***QUILLAUD PIERRE, Kasisto***
***CARON SYLVIE, Sekretariino***
***POULAIN GUNNEL, Helpsekretariino***
***DOMINGO CATHERINE, Junulfako*** ***NICOLAS YVES, Bultenisto***

# NIA VIVO EN .... LE HAVRE

*Dum tiu jaro, ĉiuj kursgvidantojproponis perfektiĝan kurson en la Asocio, aŭ en Junulardomo. La kunlaborado kun Urba Servo al Emeritulој ĉesis dum Junio. Pri monataj kunvenoj, ili regule kunvenigas dekon da partoprenantoj. Neniu granda manifestacio okazis tiujare. Kutime kelkaj klubanoj partoprenas Universalan Kongreson. Tiun jaron, ili prefere travivadis staĝon en Grésillon dum Julio. Ses Havranoj tiel plibonigis kaj pli lertigis sian scipovon de la internacia lingvo.*

*Okaze de ĝemeliĝa interŝanĝo, nia klubo esperas sian britan korespondantaron viziti dum Majo 1991. Projektoj ankoraŭ baldŭ konkretiĝos.*

***Sylvie CARON***

# ROUEN

**VIZITO DE LENINGRADA AMIKINO**

Ĉiuj Esperantistoj kiuj iam vizitis Leningradon havis okazon renkonti Barbara **CVETKOVA**. Ŝi kaj ŝia filino Valerija vivas por Esperanto kaj estas je dispono de ĉiuj turismantaj samideanoj. Mi renkontis ilin dufoje... antaŭ 30 jaroj !!!... kaj antaŭ 7 jaroj. Barbara kiu delonge deziris viziti Francion, nur lastan someron sukcesis realigi sian revon. Mi sendis al ŝi invitleteron kaj dank'al esperantista solidareco, ŝi povis viziti multajn el siaj geamikoj en Francio.

En Grand-Quevilly, ŝi parolis, okaze de grupkunveno, dum tri horoj antaŭ 20 personoj. Ŝi rakontis pri siaj junaj jaroj dum rusa revolucio, pri stalina diktaturo, prisuferoj dum 900 taga leningrada sieĝo fare de nazioj kaj pri nunaj malbonegaj vivkondiĉoj.

Dum ŝia restado en Normandio, ŝi havis okazon renkonti aliajn samideanojn en Yvetot, en Hautot sur Seine, kaj en Le Havre. Familio Nicolas el Hérouville veturis al Grand-Quevilly por kun ŝi diskuti.

**NIA VIVO EN ROUEN**

La Rùena Grupo delonge ne kunvenis ĉar ĝi ne plu havas Prezidanton. Tiuj kiuj deziras aktivi en grupestraro bonvolu kontakti Petro Kijo.

Feliĉe, apud Rouen, en Le Grand-Q uevilly, ĉiuĵaŭde de la 17a horo 30 ĝis la 20a horo, en Centre Socio Culturel, okazas kurso perfektiga kun 15 partoprenantoj ; inter ili estas membroj de nova grupo en Grand-Couronne. La metodo uzita estas amuza. Rùenanoj povos ankaŭ ĉeesti. Ili estos bonvenaj.



**Pierre QUILLAUD**



**YVETOT**

En 1989, la unua grada kurso ne funkciis pro manko da-aliĝoj, sed la duagrada kurso regule okazis ĉiulunde je la 17a horo en la Junuldomo. Tri personoj partoprenis ĝin.

La ĝenerala kunveno de la grupo okazis dum Decembro, kaj tiam, oni decidis unue prepari tradukon de la prospekto de la Turismoficejo, kaj due organizi publikan tagmanĝon kun distra posttagmezo. La turisma prospekto estas nun tradukita sed ne ankoraŭ presita. La publika tagmanĝo okazis la 11an de Marto kun bona sukceso kaj tre agrabla etoso.

La 8an de Junio, S-ino Barbara Cvetkova, el Leningrado, okdekjara, vizitis Yvetot kaj estis akceptita de Ges-oj Pottier. La 10an de Junio, ŝi venis denove kaj estis akceptita de Sinjorino Sallio. Bedaŭrinde, ni sciis tro malfrue la datojn de ŝia veno, por organizi pli solenan akcepton, nur kelkaj Esperantistoj povis ŝin renkonti.

Dank'al Ge-oj Chevallier, Ges-oj Pottier povis paroli pri Esperanto ĉe la regiona stacio "Radio Résonance", dum unu horo kun kelkaj muzikaj paŭzoj inter kiuj estis kantoj en Esperanto. Informvespero okazis en la Junuldomo la 1an de Oktobro. Nur une persono venis, el Le Trait, kaj decidis ĉeesti la kurson por komencantoj okazonta ĉiumarde ekde la 9a de Oktobro... sed li ne venis !

La duagrada kurso havos 2 lernantojn : Ges-oj Chevallier.

S-ro Pottier skribis al "Radio Bleue" por danki pri elsendo pri Esperanto okazinta la 20an de Aŭgusto, kaj al "La Vie" pri ĝia artikolo pri la vojaĝo tra la mondo de 2 Francoj, per Esperanto.

Pierre POTTIER

**HER...**

La studjaro aktive finiĝis ĉar nia grupo akceptis en Junio Sron Povilas Jegorovas, litovon, kadre de la vojaĝrondo kiun organizis U. F. E.. Li publike prelegis pri la nuna tre streĉa situacio en Litovio. Freddy Taipied kaj Y. Nicolas tradukis por tiuj kiuj, inter la 25 ĉeestantoj, ne scipovis Eon. La ĵurnalo "Ouest-France" tre favore raportis. Ni tuj tradukis la ĉefojn de tiu vespero kaj ĝin sendis al 80 adresoj (urbestro, gazetoj, indi-

...VILLE

viduoj). Tre certe respertinda afero.

De tiu lasta somero Hérouville ĝemeliĝas kun Tiĥvin, apud Leningrado. Nia estis la unua rilanta kun Tiĥvinanojn ! Donacojn ni jam interŝanĝis pere de la oficiala delegacio kiu restadis en Tiĥvin. Ni jam en kunveno organizita en la urbo domo, reliefigis la eblecojn de Esperanto por pli rapidigi la rilatojn inter la loĝantoj de ambaŭ urboj. Ni ŝatus organizi ion kun niaj sovetaj samideanoj por alporti pruvon plian de efikeco, sed distancoj ne faciligas la rilatojn.

Kvar membroj de nia loka asocio partoprenis la vojaĝon organizitan de UFE al Bulgario. Nova temo por niaj ĉiumonataj prelegoj ! 7 lernantoj en la unua grada kurso, 8 ĝis 10 en la dua alportas esperon por pli vasta propagando. Jam ni partoprenis la feston de la asocioj, en kiu ni havis budon kiun vizitis pli ol 60 interesatuloj.

Yves Nicolas

*****************************************************************************



**LA KASISTO INFORMAAAAAAS !!!**

+++++++++

Jen la jarfino ! Cu vi pagis vian kotizon por 1990 ? En la bulteno N°167, aperis unua listo de pagintoj. Jen ĉi-sube dua listo de kotzoj ricevitaj inter Marto kaj Novembro 1990.

Gesinjoroj : LEGROS, ROBIOLLE, ROLLAND, TOUILEB, MARY, CHALM, GUILMOT, ANGENAULT, LEHERICEJ, MONTAGNE, VERON, BATAILLE, BETTENCOURT, DESANSAC, LORIN, MOREL, GINESTE, LANEY, GUERRE, LEBRUN, JOUVIN.

Mi memorigas ke, por novaj gelernantoj la abono estas sen paga, sed nur dum unu jaro.

Ekde nun, vi ankaŭ povas sendi vian kotizon por la nova jaro 1991 !


Multe Dankon !

*****************************************************************************

*NI FUNEBRAS*

Nia amikino Jacqueline **LHERMITTE** forpasis post longa kaj doloriga malsano. Ŝi estis tre konata de fervojistoj ĉar ŝi respondecis pri perkoresponda kurso de fervojista asocio. Ŝi logis parte en Parizo, parte en Sotteville les Rouen kaj ŝi fariĝis ankaŭ aktivulino de Rùena gruupo ; ŝi prizorgis finsemajnajn staĝojn en Rouen.

Tre sindonema por nia idealo, ŝi vivis grandparte por Esperanto. Nia amiko Robiolle prezidanto de fervojistaj esperantistoj skribis al ni : "ĝis la lasta konscia momento, ŝi parolis pri Esperanto-aferoj. Ŝia morto estas grava perdo por Esperanto ĝenerale kaj precipe por FFEA kie ŝi estos malfacile anstataŭebla."




## kongreso de SAT-Amikaro.

*La venonta kongreso de SAT-Amikaro okazos en Amboise de la 30a de Marto ĝis la 2a de Aprilo. La partoprenantoj kompreneble povos viziti la domon de Leonardo deVinci, la poŝtmuzeon, la kastelojn de Ambuazo, ankaŭ de Chenonceaux. Tamen laŭ la deziro de la organiza komitato ili pli profundigos kongrestemon pri la protektado de la riveroj kaj de la akvoj. La kongresurbo situas en la tre fama Luarvalo. Ni atendas prelegantoj el Anglio, Germanio, Ĉekoslovakio kaj Sovetunio por informi nin pri la situacio en aliaj mondpartoj; Aparte atendita estos kontribuo de japana samideano pri la ĉefrivero Nagara. En rilato kun la lokaj ekologiaj asocioj, multaj pririveraj aktivaĵo ebligos ektuŝon de la problemoj : kanuado, padbiciklado, manlaboretoj, ktp... Sportemuloj kunportu tenisilaron, kaj la nepre necesajn kursŝuojn por la matenkurado ! La originaleco de la kongreso kuŝos en la starigo de intensivaj kursoj por komencantoj laŭ kvar niveloj. Tiuj profitos tujan uzon de la lingvo kaj la diversajn vesperajn aranĝojn kiel la aliaj partoprenantoj.*

*INFORMAS : Marc Noulin, Les Monts, 41 360 LUNAY, Tel. : 54 72 15 11*

# Ĉu vi sekvas la novaĵojn?

## Kiu organizaĵo en 1989-1990:

- organizis la plej grandan E-renkontiĝon en ambaŭ Amerikoj?
- ligis rilatojn kun sep novaj landaj asocioj el Eŭropo, Afriko kaj Azio?
- pledis por la rumana Esperanto-movado ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kaj poste subtenis ties renaskiĝon per libroj, revuoj kaj membrigoj?
- elspezis pli ol 100 000 guldenojn por disvastigi Esperanton en la evoluantaj landoj?
- renovigis sin per la ŝanĝo de ok el siaj naŭ estraranoj?
- radikale plibonigis la aspekton de la plej legata revuo en Esperanto?
- aperigis kaj senpage dissendis ilustritan librokatalogon en dekmil ekzempleroj?
- realigis ĉion ĉi kiel parton de sia Strategia Plano por la dua jarcento de Esperanto?

## Nur unu tia organizaĵo ekzistas. Kaj ĝi bezonas vin.

# Subtenu la tutmondiĝon de Esperanto. Membriĝu en UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 13806,
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

---

Por membriĝi, plenigu la ĉi-suban slipon kaj sendu ĝin (aŭ fotokopion) al via landa peranto:

Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris

Mi membriĝas en UEA en la indikita kategorio por la jaro 1991 kaj kunsendas mian kotizon:

☐ MA Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj revuon *Esperanto*), 225 F.
☐ MA-K* Juna Membro-Abonanto (ĝis 29 jaroj–ricevas ankaŭ la revuon *Kontakto*), 225 F.
☐ MJ Membro kun Jarlibro (ricevas la Jarlibron, sed ne la revuon), 90 F.
☐ MJ-K* Juna Membro kun Jarlibro (ĝis 29 jaroj–ricevas ankaŭ la revuon *Kontakto*), 90 F.
☐ MG Membro kun Gvidlibro (minimuma kategorio), 40 F.
☐ DM Dumviva Membro (ricevas la Jarlibron kaj revuon dum la tuta vivo), 5625 F.

Nomo ______________________________

Adreso ______________________________

______________________________

*Naskiĝdato ______________ Profesio ______________

Dato ______________ Subskribo ______________